

Ĉu korekti ? Kiel korekti ? Kiam korekti ?

Okaze de parolaj agoj

Okaze de skribaj agoj la temo estis traktita en IPR 2015 / 2 p. 36

Paroli en fremda lingvo, per fremda lingvo, estas tikla tasko. La lernanto havas ideon en sia kapo, povus diri ĝin en sia lingvo, tamen devas vesti ĝin per aliaj vortoj kaj meti ĝin en aliajn frazojn. La situacio en la cerbo similas al flugo de papilio kaptita en japanstila lampo. Pro tio mi kutimas ne korekti en tiu momento. Se mi korektus, mi bremsus tiun procezon kaj malkuraĝigus la parolanton. Pro tio mi kutimas havi paperfolion antaŭ mi kaj mi notas la klarigendajn punktojn. Klarigoj venas poste, post la fino de la frazo, de la ekzerco, de la skeĉo, de la parolado.

Ĉu ĉiu eraro meritas klarigon? Ne. Ni devas kompreni, kio estas **dumparolaj eraroj**, ĉar tiuj eraroj ne bezonas klarigojn. Okaze de parol-ago la cerbo havas tiom da malsamaj taskoj samtempe farendaj (trovi la ĝustan vorton, meti la taŭgan finaĵon, meti la vorton en ĝustan lokon en la frazon, adekvate prononci, konservi la ritmon por konservi la atenton, reagi al demando per taŭga respondo....), ke okazas paneoj: la studento forgesas ekzemple la finaĵon –N. Tio povas okazi al mi... Tamen li aŭ ŝi tute bone scias, ke en tiu loko de tiu frazo –N devas veni. Sed okazas tia paneeto pro la fulmrapida prizorgado de ĉiuj tiuj aspektoj en la cerbo. La parolanto aŭdas sian eraron en la sama momento, kiam la aliaj ĉirkaŭ li/ŝi aŭdas la eraron. Post tiu malagraba momento la parolanto ofte rediras mem sian frazon sen eraro. Li/ŝi bonege komprenas la gramatikan punkton. Neniu klarigo endas.

Se iu eraro ripetigas, tiam la instruisto povas poste interveni ekzemple farante demandon, kie la studento devos uzi tiun vorton, tiun situacion. Tio ebligas al la instruisto kontroli, ĉu la studento bezonas klarigon aŭ ne.

Do la unua grava aspekto estas **ne ĝeni la parolfluon** per korektado; apartigi la paroladon de la korekta momento.

Dua grava aspekto: Okaze de kurso la korektado ĉiam devas esti pozitiva. Ni evitu jenajn dirojn: “Ne diru tion! Jen vi forgesis –N! Denove vi misprononcas sc...” Tiaj reagoj de la instruisto malkuraĝigas la lernanton. Ni simple ripetu la parton ĝuste. Plie ni povas diri: “Atentu! Jen venas –N. Tiu aspekto vere estas malfacila. Ĉiuj penas metante –N en la ĝustajn lokojn.” Ni reliefigu la kvanton de ĝustaj respondoj pli ol la kvanton de eraroj. Se ni korektas severe kaj

negative, la lernanto ĉesos produkti paroladon.... kaj tio ne estas nia celo. Nia celo estu la **progreso** de la lernanto, ĉu ne...

Oni povas abunde kaj efike atentigi la lernanton per diversaj mienoj, okuloj malfermiĝantaj, rigardo severa, subita rideto post sukcesa prononco, leviĝanta fingro, spirado ĉesanta, kapo kliniĝanta, korpa lingvo.... tiom da teatrumado, **mimado**, senvorta komunikado. La lernanto kaptas tion kaj la fluo de lia/ŝia parolado ne estas bremsita. Tio estas tre efika strategio, kiam ĝi uzatas en humurplena pozitiva etoso.

Oni povas ankaŭ paki ian atentigon **en natura dialogo**. Tio estas agrabla kaj afabla strategio. Se iu lernanto diras: "Mi iros al Francion." mi plu parolas dirante: "Belege! Vi havos la okazon iri al Francio!" Laŭ tiu maniero mi kontribuas al la Facebook-paĝo "Duolingo Esperanto Learners". Eble la lernanto kaptos la korektadon, eble ne. Tiuj, kiuj kaptas la korektadon, ofte tuj refaras frazon, por montri al mi, ke ili komprenis mian korektadon. Tio okazas sen ia anonco, ke nun mi korektas lin aŭ ŝin. Tute nature, en la dialogo. Pruvo estas ia amika rigardado reciproka kun ridetoj. Mi tre ŝatas tion. Sed kelkaj personoj tute ne kaptas tian strategion; ili estas sur siaj reloj kaj plu uzas eraran strukturon aŭ vorton. Tiam (se ni estas en libera kongresa etoso) mi iras al plia paŝo: "Ĉu vi deziras, ke mi korektu vin?" Depende de la respondo mi korektas aŭ ne. Kutime la personoj jesas, feliĉe. Okaze de kurso mi devas korekti, kompreneble. Kelkaj personoj estas tiom fieraj kaj memkonsciaj, ke oni ne povas korekti ilin. Fakto estas, ke lernado bezonas modestecon: la lernanto devas havi fidon en la instruisto. Se tia fido mankas, la persono ne progresos. Bedaŭrinda afero... Se tio okazas al vi, ne zorgiĝu! Tio ne signifas, ke vi estas malbona instruisto!

Ĉu korekti? Kiam mi estas kun komencanto okaze de kunveno, kongreso, mi kutimas ne korekti. Se en tia situacio mi parolas kun altnivela parolanto, kiu faras tre malmultajn erarojn, tiam mi emas korekti. Eraro en belega parolado pli ĝenas ol erarplena balbutado, laŭ mia sento. Mi anoncas tian mian emon korekti. La altnivela parolanto komprenas, ke estas kvazaŭ honoro por li aŭ ŝi, ke mi ekkorektas; tio montras, ke li aŭ ŝi ne plu estas komencanto. Do mia sinteno donas al li/ŝi **motivon**. Tio estu nia celo, ĉu ne...